

Ora Ĵurnalo

Numero 45, Novembro 2021



"Thamska Huset" sur Norra Hamngatan

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	”Globasembleo” paralele kun COP 26.....	15
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Bona decido de la EU-parlamento.....	19
Espeporko meditas.....	3	Pri Auschwitz – Memoriga oficiala kunveno en Malmö pri la Holokaŭsto, la 13an de oktobro.....	19
Memorigo pri la Skribkonkurso.....	3	La bibliotekistino en Auschwitz	20
Atlantoj kaj kariatidoj.....	4	Pri gazetoj en la mondo	21
Kariatidoj estas virinaj skulptaĵoj, kiuj apogas tegmenton aŭ terason	4	El la Bultineto, Aŭstrio	21
La tria reala kurskunveno en Redbergsskolan	5	La Blanka Rozo	23
La dua grupo.....	6	La mandato de UN – dekolonii Okcidentan Saharon / FN-mandatet är att avkolonisera Västsahara!.....	25
Lernejanjoj de Gotenburgo vizitas malnovan lernejon en Gunnilse	7	Libera Folio, mirinda revuo.....	26
Aŭtomata fotilo estas tre praktika, se oni volus scii, kiuj bestoj vizitas vin nokte.....	9	”Arne, la ĉefido”, nun ankaŭ en la albana ...	28
Lunleviĝo	10	HeKo – retagentejo de la Esperanta Civito..	29
Promeno sur Hyppeln – Promenad på Hyppeln	11	Pri Louis Armstrong.....	29
Moska anaso	11	La Gotenburgaj Koloristoj – Göteborgkoloristerna	31
Kiom da kruroj havas milpiedulo?.....	12	Galerio de Ivan Ivarsson.....	32
Lottie kaj Davido tendumas en norda Kanado.....	12	Nova infanlibro de Julian Modest.....	32
Parolibereco – Yttrandefrihet	14	Inter bestaĉoj kaj bestaj estaĵoj en la zoo de Borås! – Bland odjur och djur i Borås djurpark!	33
Lars Vilks, pridiskutita artisto, ĵus forpasis...15		Baltiaj Esperanto-Tagoj.....	38

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas



- ☆ Makro- kaj mikromondo – ĉio interesas min. Agrablas legi pri la spertoj de infanoj kaj ankaŭ pri la provoj de plenkreskuloj solvi la mondajn problemojn.
- ☆ Kiom da kruroj havas milpiedulo? Kiel reteni la rajton libere esprimi sin? Du ekzemploj pri diskuttemoj!
- ☆ En novembro mi, Espeporko, celebras mian naskiĝtagon. Ekde 2017 Ora Ĵurnalo aperis 11 fojojn jare. Mi dikiĝis pri la paĝnombroj kaj mi atingis pliajn legantojn. Do, la 13an de novembro ni celebros la tagon, manĝante torton en Redbergsskolan kun gasto de Tidskriftsverksta'n. Tial multaj artikoloj estas el gazetoj.
- ☆ Kvar fojojn el ok ni jam havis esperantan kurson en Redbergsskolan. La kvinan kaj sesan fojon ni eĉ havos kaj kursojn kaj prelegojn. Espereble ni povos daŭrigi kun realaj renkontoj.
- ☆ Ĉiam bonas ke gastoj ŝatas Gotenburgon. Jack Warren de Britio eĉ skribis poemon

pri nia urbo. Temas pri la gotenburgaj tramoj, kiujn li spertis dum la UK 2003. Li ankaŭ ŝercas pri la korono-maskoj. Oni devas ŝerci pri seriozaj aferoj, ĉu ne?

- ☆ Mi esperas ke la bestoj en la bestoĝardeno de Borås havas bonan vivon. Almenaŭ estas la opinio de multaj infanoj, kiuj povas ĝui la kunestadon de ili sen timo de la rabobestoj.
- ☆ Sveddevena Lottie Ericson kaj ŝia amiko Davido tendumis en norda Kanado kaj renkontis bestojn kiel grizajn ursojn kaj bizonojn. Veraj aventuroj!
- ☆ Gravas raportoj pri mondaj okazaĵoj kiel la klimatkongreso en Glasgow, la Saĥarov-premio al Navalny, la kongreso en Malmö pri la holokaŭsto k.t.p.
- ☆ Por ni ankaŭ gravas pri okazaĵoj en Gotenburgo kaj ties kulturo – ekzemple pri la artaĵo de Ivan Ivarsson.

/Siv

Memorigo pri la Skribkonkurso



Partoprenu en la skribkonkurso de Ora Ĵurnalo! Kontribuu al Ora Ĵurnalo antaŭ 1/12 2021. Skribu pri somera memoraĵo! Ĉiuj skribaj ĝenroj estos akceptitaj. Bonvenon! Bv. sendi vian kontribuon al siv.burell@gmail.com. La redakcio legos la artikolojn. Ne forgesu skribi vian nomon, retadreson kaj telefonnumeron! **/Ingegerd**

Atlantoj kaj kariatidoj

”Thamska Huset” sur Norra Hamngatan, Gotenburgo, havas du atlantojn, kiuj gardas la enirejon. Ili anstataŭas kolonojn.



El Wikipedia:

Atlas portas la ĉielon, laŭ la tradicio. Temas pri la Atlasmontoj en la nordokcidenta Afriko, kie estas la loko de la atlantoj.



Atlantoj – ankaŭ nomataj Atlas aŭ Telamon, originas de roma resp. greka mitologioj.

Ili estas kolonoj, formitaj kiel viraj skulptaĵoj, kiuj portas trabarojn, balkonojn kaj similajn.

Kolonoj, kiuj male prezentas virinojn nomiĝas kariatidoj.

La grekaj atlantoj estis skulptitaj kvazaŭ ke ili facile portus la ŝarĝon sur siaj kapoj aŭ sur siaj suprenetenditaj brakoj.

La romaj atlantoj, kaj – pli poste – atlantoj de la renesanco kaj baroko, estas formitaj baraktantaj kun la ŝarĝo kaj suferantaj de ĝi.

Atlanter, även kallade Atlas eller Telemon kommer från romersk resp. grekisk mytologi.

Det är pelare, som utformas som mansfigurer, och som bär upp bjälklag, balkonger o dyl.

Pelare som istället föreställer kvinnor kallas karyatider.

De grekiska atlanterna skulpterades så att det såg enkelt ut för dem att bära bördan på sina huvuden eller på uppsträckta armar.

De romerska atlanterna, och senare atlanter från renässans och barock, utformades kämpande med bördan och plågade av den.


Kariatidoj estas virinaj skulptaĵoj, kiuj apogas tegmenton aŭ terason

Wikipedia: <https://sv.wikipedia.org/wiki/Karyatid>

Kariatido (de la greka kiryatides, knabinoj de la urbo Karyai en Lakonio) estas virina skulptaĵo, kiuj estis uzata kiel apogo anstataŭ kolono.

↓

En karyatid (av grekiskans karyatides, flickor från staden Karyai i Lakonien) är en kvinnoskulptur som används som stöd istället för en kolonn.



Plej famaj estas la ses kariatidoj sur Akropolis, Ateno. La romanoj uzis la kariatirtemon.

La renesanco kaj precipe la baroko ankaŭ uzis la kariatidtemon.

/Siv

Mest berömda är de sex karyatiderna på Atens Akropolis. Romarna tog upp karyatidmotivet.

Renässansen och i synnerhet barocken tog även upp karyatidmotivet,

/Siv

La tria reala kurskunveno en Redbergsskolan de Siv

Kolektiĝis 12 personoj. Unue ni celebris la morgaŭan tagon – la UN-tagon (24 oktobro). Ni kantis du kantojn – unue "La balado pri la blua vaska ĉap" kaj poste la EU-himnon "Al la ĝojo".

Ni ankoraŭ ne havas regulan kurson kun lernolibro, sed prenas materialon el Ora Ĵurnalo por diskuti. La du grupoj elektis malsamajn temojn kaj laboris dum unu horo. Sekvis kafaŭzo kaj poste la unua grupo raportis al la dua grupo pri sia laboro per dialogo. Du personoj, kiuj iris sur la nova

ponto Hisingsbron, bedaŭris ke la malnova ponto estis detruiĝinta. Parton de ĝi ankoraŭ estas videbla.

Jan ankaŭ kontribuis per gaja rakonto kun tipa gotenburga humuro, malfacile tradukebla en Esperanton, ĉar ĝi baziĝas sur vortludo kun gotenburga elparolo. (Se oni demandis la pontogardistojn, kiuj sidis en budo super la rivero, pri la horo, ili respondis ke ĝi ĉiam estas "post la deknua". En la gotenburga dialekto tio ankaŭ povas signifi "super la rivero".)

Ingegerd fotis. Jen ŝiaj bildoj:

Jan



Monica



Margareta



Christin, Siv



Lasse



Andreas, Lena



La dua grupo de Ingegerd

Andreas gvidis la duan grupon kaj ni legis pri "la velboato" el numero 43 de Ora Ĵurnalo. La artikolo temas pri fizika problemo, skribita de Lasse Granat.

En la grupo ni legis kaj tradukis. Poste ni faris fabelon pri la lernado de Esperanto, kiu tekstas jene:

La juna studanto volas rakonti pri sia studado de esperanto. Li pensis ke estas simpla tasko

lerni esperanton! Sed vere ne! Li devis viziti kursojn.

Poste li fariĝis verkisto kaj skribis dikajn librojn. Lia nomo estas: Sten Johansson!

Grupo du ankaŭ legis kaj tradukis la novelon "La araneo" de Lenke Szász. Bona rakonto pri la vivo!

Poste ni hejmeniras / hejmenbiciklas en suna vetero.

Jan, Margareta, Francisco



Andreas



Erika, Christin, Siv



Lernejoj de Gotenburgo vizitas malnovan lernejon en Gunnilse

Ili veturis per aŭtobuso al Gunnilse kaj promenis en pluva vetero en rekta vico al la malnova lernejo de Gunnilse. En la klasĉambro jam troviĝas du pupoj (knabino



kaj instruistino – aŭ patrino). La rektoro jam estis tie por ĉeesti la unuan tagon kiam la "unua-klasanoj" estos registritaj.



Nun la reala instruisto estas surloke (Ingegerd). Per sonorilo ŝi kunigas la infanojn,

kiuj eniras la klasĉambron. Ŝi bonvenigas ĉiun laŭvice.



Ŝi demandas al la gelernantoj, kial oni devas viziti lernejon. La infanoj levas la manojn kaj bone respondas. Ŝi rakontas ke ŝi mem estis lernanto en ĉi tiu lernejo kaj sepjara Elina »



bone ludas la rolon de eta Ingegerd. La patrino diris al la rektoro ke la knabino skribas per la maldekstra mano – "kaj tiel estu ankaŭ estontece", ŝi firme diris!! Unue la

rektoro iomete objetis, dirante ke ne estas kutimo skribi per la maldekstra mano, sed la

decidema patrino venkis, kaj la rektoro notis la fakton.




Poste Elina, kiu rolis Ingegerd kiel knabino, sidiĝis en la ĉambro. La lernejo estas ja ne timiga.

La instruisto montras la iaman "legoplaton", tute ne simila al la nunaj elektronikaj platoj.

Hodiaŭ la malnovaj malbone legeblaj literoj estis ŝanĝitaj al modernaj literoj. La hodiaŭaj lernantoj povas legi multe pli frue ol la hieraŭaj.

La instruisto ankaŭ parolis pri la punoj – bato per bastono aŭ stari en la punangulo, eble tutan horon. La nunaj gelernantoj trovis tiun punon stranga, sed volonte provis stari tie kun la vizaĝo turnita al la angulo. Ĉu vi vidas la knabinon?



Vere estis mirindaj teatro kaj informo pri malnovaj tempoj. Mi estis gasto kaj tre dankas pro la amuzo mateno! Lasse prizorgis la lumbildojn, kiuj sekvis la rakonton de Ingegerd.

Mi estas certa ke la junaj lernantoj disvastigos siajn spertojn pri la malnova lernejo en Gunnilse. Do, tio certe ne estas la lasta fojo kiam gotenburgaj lernantoj vizitos Gunnilse. /Siv

Sube kelkaj bildoj el la broŝuro, kiun faris Ingegerd kaj Lasse.



Kiam estis paŭzo la infanoj manĝis kolbason kun pano, sed la tri roluloj iris al la muzeo sur la unua etaĝo.





Blåsippan ute i backarna står
niger och säger att nu är det vår.
Barnen de plocka små sipporna glatt
rusa sen hem under rop och skratt.



Oni tiam kaj nun
kantis/kantas
pri la blua
anemono.



Aŭtomata fotilo estas tre praktika, se oni volus scii, kiuj bestoj vizitas vin nokte

Walter Klag havas. Jen bildo pri kaprioloj en Aŭstrio.





Lunleviĝo

de Renate Säfström

Månuppgång

Titta, där är mångubben!
En gyllene satellit.

Du lilla ljus om natten
vem hjälper dig upp
över mörka trädtoppar?

Du får inte fastna där
då blir det för mörkt.

Vem ger dig lyskraft
så trofast natt efter natt?

Du strör glitter
och djupet skrämmer inte mer.

Ja, det är sant
jag kan lita på det han skrev

... ljuset lyser och mörkret
har inte övervunnit det.

Lunleviĝo

Rigardu, jen la viro en la lun'!
Ora satelito.

Vi, malgranda lumo nokte
kiu helpas vin leviĝi
super malhelaj arbopintoj?

Vi ne devas kaptiĝi tie
tiam estus tro mallume.

Kiu donas al vi lumpotencon
tiel fidele, nokton post nokto?

Vi disŝutas brilaĵon
kaj la profundo ne plu timigas.

Jes estas vero
mi povas fidi kion li skribis

... la lumo brilas kaj la mallumo
ne venkis ĝin.

Ingegerd tradukis

Promeno sur Hyppeln – Promenad på Hyppeln

Teksto kaj foto/text och foto: Jan Hellström

Agrable rondiro sur la insulo Hyppeln komenciĝis en griza vetero kaj finiĝis en sunbrilo. Ni vidis i.a. sulon, kormoranon kaj nigran orion.

Kiel fino de la arkipelaga vizito – delikata lunĉo sur la insulo Öckerö kun marpanoramo, fiŝsupo, patkukoj kaj ovo-fromaĝo. La bildo montras la panoramon de Hyppeln al Rörö.

En fin promenad runt Hyppeln började med gråväder och slutade med solsken. Såg bl.a. havssula, toppskarv och tobisgrissla.

Som avslutning på skärgårdsbesöket en utsökt lunch på Öckerö med havsutsikt, fiŝsoppa, pannkakor och äggost. Bilden visar utsikten från Hyppeln mot Rörö.



Moska anaso

sur bona enveturejo en Björlanda, Gotenburgo.

Laŭdire ĝi ŝatas limakojn.

Muskanka på en gårdsinfart i Björlanda 18/10–21.

Lär gilla sniglar.

(Jan Hellström, Facebook)

Kiom da kruroj havas milpiedulo?



milpiedulo

Jes, kiom da kruroj vere havas milpiedulo?

Kial oni ne nomas ĝin centpiedulo – certe pli proksime al la vero ol milpiedulo??

De Inga Johansson

Bildo: Twitter.

google översätter *centpiedulo*

baskiska – centipede (engelska!)
bosniska, serbiska – stonoga (sto = 100)
bulgariska – стоножка (100)
danska – tusindben (1 000)
finska – tuhatjalkainen (1 000)
franska – Mille-Pattes (1 000)
gaeliska – ceud-chasach (100)
irländska – céadchosach (100)
galiciska – ciempiés (100)
gujarati – Sēntṛipīḍa (100)
italienska – centopiedi (100)

jiddisch – sentipede (100)
katalan – centpeus (100)
kroatiska – stonoga (100)
kurdiska – kêzika hezarpê (1 000)
lettiska – simtkājis (100)
litauiska – Šimtakojis (100)
mongoliska – zuun nast (100)
nederland – duizendpoot (1 000)
portugisiska – centopéia (100)
somaliska – boqol – dhudhun (100)
tyska – Tausendfüßler (1 000)
ungerska – százlábú (100)
walesiska – cantroed (100)

Lottie kaj Davido tendumas en norda Kanado



(Mi renkontis Lottie Ericson en UK en Lahtis 2019. Ŝi estas svedino, kiu transloĝiĝis al Kanado. Ĉi tie ni scios pli pri la fora ekzotika norda Kanado. Koran dankon, Lottie kaj Davido! /Siv)


Kiam ni returnis hejmen la plejofta demando estis "Estis tie multe da moskitoj, ĉu ne?" Kaj estis. Ĉi tie estas la plej granda kiun mi renkontis.

Ni traveturis regionojn de bienoj kun brutaro kaj ili ankaŭ vere pensis ke ili posedas la vojon.



Ni vidis ankaŭ nesurvojn bestojn. Ĉi tie dolĉaspektan vulpon.

Mia amiko Davido kaj mi ŝatas esploradon. Pasintsomeron ni faris grandan veturadon al La Jukonaj. Ĉi tie vi vidas mapon. Jukono estas granda regiono kun ne multaj personoj, ne multaj vojoj, ne multaj urboj, ne multaj urbetoj.



Ni tendumis kaj multofte kuiris ekstere sed memklare ni ankaŭ vizitis restoraciojn kaj kafejojn, kie ni multfoje ĝuis bongustajn cinamrulojn.

Kiam Davido malsatis li aĉetis grandan cinamrulon. Jes, tre, tre grandan!

Ni vidis multfoje ŝildojn kun indiĝenaj vortoj. Ekzistas multaj indiĝenaj lingvoj kaj dialektoj en Kanado, precipe en Norda Kanado.






Ni klare esperis vidi bestojn. Kaj okazis, kvankam multfoje survoje. Ĉi tie alkbovino kun alkbovido. Kalkulu kruroj!



Kaj bisonoj. Ili vere pensas ke ili posedas la vojon.



Kaj dum flosvojaĝo ni havis bonŝancon vidi grizursan patrinon promeni kun sia ido. Ni estis feliĉaj ke ni estis en boato kaj ne tre apude.

Vidu grandan kastoran loĝejon! Estis tiel granda kaj forta ke gi haltigas la lagoakvon.



Parolibereco – Yttrandefrihet


De Kalle Kniivilä, Facebook

La lastajn dek jarojn Rusio petis al Guglo bloki pli multajn paĝojn ol la aliaj landoj kune. Jen la vico de blokantaj landoj laŭ grandeco:

Rusio, Turkio, Barato, USA, Brazilo, Nordkoreo, Britio, Francio, Germanio, Italio, Hispanio. – La libera vorto suferas.

De senaste tio aŭren har Ryssland begärt att Google blockerar fler sidor än alla andra länder sammanlagt. De blockerande länderna i storleksordning:

Ryssland, Turkiet, Indien, USA, Brasilien, Nordkorea, Storbritannien, Frankrike, Tyskland, Italien, Spanien.




Lars Vilks, pridiskutita artisto, ĵus forpasis

en trafikakcidento kune kun siaj du policistaj gardistoj. Pro sia "trafikcirkla hundo", artaĵo centre de trafikcirklo prezentanta la profeton Mahometon, li estis mortminacita de islamistoj. Ĉu Lars Vilks estis provokanto aŭ probatalanto de la libera parolo kaj la libera arto? Eble ambaŭ. Sed la tuta vivo ŝanĝiĝis por li. La puno ne estis proklamita de iu tribunalo, sed de islamistoj.

Jen la interreta teksto apud la foto:

Lars Vilks estis elpelita kaj proskribita.

Dum plej malnovaj epokoj la proskribiteco estis nur iomete malpli danĝera ol vera mortpuno. Ĉiu lia havaĵo estis perdita, konstruaĵoj estis forbruligitaj kaj mencioj pri li



estis malregistritaj kaj oni forprenis de li ĉian juran defendon. En la rigardo de la socio li jam estis morta. / Wikipedia

/Siv

"Globasembleo" paralele kun COP 26

– the 26th Conference of the Parties (= COP) to the United Nations Framework Convention on the climate Change



**UN CLIMATE
CHANGE
CONFERENCE
UK 2021**

IN PARTNERSHIP WITH ITALY

La klimatkrizo estas diskutita en Glasgow, Skotlando, 1–12 novembro. Kunlaboranto estas Italio.

Dum la klimatkonferenco la mondaj landoj intertraktos kiel la Pariz-konvencio estu realigita kaj kiel la ambicioj de la klimatkonferenco povus esti altigitaj.

La urbo Glasgovo preparas gastigi la gravan COP 26 – Klimatan Konferencon de la 1a ĝis la 12a de novembro.

Ĝi estis prokrastita en 2020 pro la pandemio. La Delegitoj intertraktas kun fokuso pri la bezonoj de la tuta mondo kaj tute konsideras la sociojn, kiuj jam suferas mondan varmiĝon.

Kiel kutime ĉiuj afiŝoj kaj dokumentoj estas en la angla. Kaj ĉiuj debatoj okazas en la angla, sen ia ripenso.

Riksablo, loĝanta en Leeds, nordanglio, rimarkis, ke organizo nomita "Global Assembly" <https://globalassembly.org/>, preparis aranĝi diskutkunvenon paralele de COP26, en kiu la partoprenantoj estu elektitaj, per hazarda metodo, el la tuta monda popolo. Tia tutmonda civitana asembleo supozeble povus iusence reprezenti la pripensojn de la tuta homaro pri la problemoj kaj eblaj solvoj rilate al

På klimatmötet ska världens länder förhandla om hur Parisavtalet ska genomföras, och hur ambitionerna i klimatpolitiken kan höjas.

Staden Glasgow förbereder sig för att vara värd för den viktiga klimatkonferensen COP26 från den 1 till den 12 november. Den blev uppskjuten 2020 på grund av pandemin, Delegaterna förhandlar med fokus på hela världens behov och tar full hänsyn till de samhällen som redan lider av uppvärmningen av planeten.

klimatŝanĝo. Tiu ideo interesis lin, do li skribis al la organizo (nomita ekde tie ĉi "Globasembleo") por demandi, kiel ili proponos akordigi la du temojn: unue, mondiskala pripensema demokratio kaj, due, lingva egaleco. (Li jam suspektis, ke ili ne vere zorgas pri la dua afero.) La esprimon "pripensema demokratio" ni uzas en tiu ĉi artikolo kiel traduko de la angla frazeto "deliberative democracy".

La unuan retmesaĝon Riksablo sendis en la 5a de oktobro:

Dear Global Citizens,

I have just become aware of the Global Assembly which will shortly convene to consider the climate and ecological crises, in the lead-up to COP26. This is an excellent idea in principle, but nowhere on your website can I find a mention of the language to be used by participants. That website, which mentions a link with the U.N, doesn't even have links to equivalents in the other five official languages of the United Nations. From this I conclude that you intend to conduct the proceedings in English.

Deliberative democracy is a healthy corrective to the kind of politics that have led humanity to the brink of catastrophe, but it requires participants to meet and discuss face-to-face in small groups without obstacles. This means that the language used is crucially important.

I'm happy with English, my native tongue, but I know all too well that the presumption that it

Karaj Karaj Tutmondaj Civitanoj,

Mi ĵus ekkonsciis pri la Tutmonda Asembleo, kiu baldaŭ kunvenos por pripensi la klimatajn kaj ekologiajn krizojn, antaŭ la COP26. Ĉi tio estas principe bonega ideo, sed nenie en via retejo mi povas trovi mencion pri la lingvo uzota de partoprenantoj. Tiu retejo, kiu mencias ligojn kun UN, eĉ ne havas ligojn al ekvivalentoj en la aliaj kvin oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj. El ĉi tio mi konkludas, ke vi intencas fari la proceson en la angla.

(Post tiam la retejo nun ja havas versiojn en aliaj lingvoj, inkluzive de la araba, la franca, la hispana kaj la ĉina.)

Pripensema demokratio estas sana korekto al la speco de politiko, kiu kondukis la homaron al la rando de katastrofo, sed ĝi postulas, ke partoprenantoj renkontiĝas kaj diskutas vizaĝ-al-vizaĝo en malgrandaj grupoj sen obstakloj. Ĉi tio signifas, ke la lingvo uzata estas gravega.

is the world's language is a fallacy. If the assembly is conducted in English, it inevitably introduces a bias. Some are advantaged, other disadvantaged. The same would apply to Chinese or Spanish, two other widely spoken languages. If, on the other hand, participants will have earpieces listening to (nearly) simultaneous interpretations, it will be infeasibly expensive and cumbersome. I assume that you will not be able to arrange for your 100 worldwide representatives to have a 6-week immersive course in Esperanto beforehand.

I fear that a tacit assumption that English is the natural language of deliberative democracy, will promote alienation among the majority of world citizens who do not speak English, and thus undermine the concept itself. I'd be grateful, therefore, if you could tell me how you propose to deal with the language issue. Thank you.

Sincerely,

R.

La 12an de septembro venis afabla respondo de stabanino de Globasembleo. Mi ne citas sed nur donas mian parafrazon, mallongigite. Tial la sveda teksto.

Klara* certigis ke estos eblecoj de tradukado kaj ke teknikaj helpiloj troviĝos. Tial ebligis havi lokajn grupojn, kiuj povus paroli sian propran lingvon. Krome, ĉiu partoprenanto havos 'akompananton', kiu helpas per tradukado ktp.

*) Kaŝnomo por konservi anonimecon.

Tamen Riksablo ne estis kontenta.

La 14an de oktobro li respondis:

Dankon, vian celon mi ŝatas, sed interplektitaj krizoj pri klimato, ekologio kaj ekonomio ne solviĝos, krom se ordinaraj homoj havas veran influon sur la ekonomio kaj akiras politikan potencon.

Sed mi estas skeptika, ĉefe pro la lingvaj problemoj. La granda afero pri pripensema

Mi estas feliĉa pri la angla, mia denaska lingvo, sed mi tro bone scias, ke la supozo, ke ĝi estas la monda lingvo, estas eraro. Se la kunveno estas farita en la angla, ĝi nepre enkondukas malegalecon. Luj estas avantaĝataj, aliaj malfavorataj. La samo validus por la ĉina aŭ la hispana, du aliaj vaste parolataj lingvoj. Se, aliflanke, partoprenantoj havos aŭdilojn aŭskultante (preskaŭ) samtempajn interpretojn, ĝi estos neeble multekosta kaj maloportuna. Mi supozas, ke vi ne povos aranĝi, ke viaj 100 tutmondaj reprezentantoj havu 6-semajnan "mergiĝan" kurson antaŭe en Esperanto.

Mi timas, ke subkomprenita supozo, ke la angla estas la natura lingvo de konscia demokratio, antaŭenigos fremdiĝon inter la plimulto de mondĉivitanoj, kiuj ne parolas la anglan, kaj tiel subfosas la koncepton mem. Mi do dankus, se vi povus diri al mi, kiel vi proponas trakti la lingvan aferon. Dankon.

Kore,

R.

Klara försäkrade att det finns möjlighet till översättning och att tekniska hjälpmedel kommer att finnas. På så sätt är det möjligt att ha lokala grupper, som kan tala sitt eget språk. Dessutom kommer varje deltagare att ha en följeslagare, som hjälper till med översättning m.m.*

**) Signatur för att bevara anonymiteten.*

Tack, jag gillar ditt mål, men invecklade gemensamma kriser som gäller klimat, ekologi och ekonomi kommer inte att lösas om inte vanliga människor har ett genuint inflytande på ekonomin och får politisk makt.

Men jag är skeptisk, huvudsakligen på grund av språkproblemen. Det som är fint med

demokratio estas, ke ordinaraĵoj povas renkontiĝi kaj diskuti kaj lerni unu de la alia kaj de spertuloj dum relative longa tempo.

Ni vidis en UN kun 6 lingvoj kaj en EU kun 22 oficialaj lingvoj kun preskaŭ samtempa traduko, ke ĝi kondukas al elitismo.

Bone edukitaj kosmopolitoj, kiuj parolas plurajn lingvojn inkluzive la anglan, havas misproportie grandan influon.

övervägd demokrati är att vanliga människor kan mötas och diskutera och lära av varandra och av experter över relativt lång tid.

Vi har sett i FN med 6 språk och i EU med 22 officiella språk med nästan simultan översättning att det leder till elitism.

Välutbildade kosmopoliter som talar ett flertal språk inklusive engelska får ett oproportionerligt stort inflytande.

Kaj Klara informis la 17an de oktobro pri la metodo trovi 100 personojn per hazarda elekto el diversaj landoj. Tiuj 100 diskutu en malgrandaj grupoj pri klimatproblemoj. Ili povus formi novajn grupojn kaj doni siajn rezultojn al UN. En loka nivelo ĉiu povus havi societon je 6–10 partoprenantoj kaj tiam uzi sian gepatran lingvon.

La 19an de oktobro Riksablo skribis al ŝi ke li volas informon kiel la diskutoj en la grupoj estos organizataj kun malsamaj partneroj ĉiun fojon. Ĉu la rezulto estus nur listoj kun nerealegeblaj proponoj?

Kun sperto de internaciaj grupoj, kiuj devas paroli la anglan Riksablo certas ke la angla ne povus funkcii kiel aŭtentika "lingua franca". Almenaŭ ni povas rekoni la lingvan problemon – eĉ ke ni nun ne havas solvon. Li

volus rekomendi Esperanton kiel solvon, kvankam ne tuta solvo en la nuna stato de la mondo.

Klara respondas ke estas la unua fojo en la historio, ke oni provos tutmondan "pripenseman demokration". Do, ilia organizo agnoskis, ke tiu ĉi provo estas okazo por lernado, kaj oni devas esti preta por modifi maltaŭgajn metodojn.

Riksablo avertis, ke tutmonde estas influgrupoj, kiuj certe ne apogas la ideon pri pensema demokratio. Do, kvankam "provo kaj eraro" necesas, kiel lernmaniero, gravas ne faru grandajn aŭ evidentegajn erarojn, por eviti doni armilojn al la malamikoj de pripensema demokratio. Iom li timetas, ke lingvaj malfacilaĵoj eble povus esti tia pafprovizo.

Jen la ĉefaj temoj de la korespondado. Espereble ni post COP 26 povos havi raporton pri ties rezultoj.

Laŭ mi la Globasembleo provis solvi la problemon iranta laŭ vojo, kiu estas uzata de organizoj kiel UN kaj EU. Por akcepti la ideon de monda lingvo oni bezonas tempon. Estas la guto kiu kavigas la ŝtonon. /Riksablo

Ĉu UEA povus sendi observantojn al UN kaj EU por ekscii pri la lingva malegaleco?

La universitatoj povus esti implikitaj. /Siv



Bona decido de la EU-parlamento

diras Kalle Kniivilä (en Facebook), kiam li eksciis, ke **Aleksej Navalnyj** ricevis la Saĥarov-premion* de 2021 pro la laboro por penslibereco.



Bra beslut av Europaparlamentet, säger Kalle Kniivilä då han fick veta, att **Aleksej Navalnyj** fick 1921 års Sacharov-pris*, för sitt arbete för tankefrihet.

**) Saĥarov estis fizikisto kaj aktiva en la soveta nuklea armilprogramo.*

Tamen li pli poste fariĝis disidento kaj probatalanto por homaj rajtoj. Li ricevis la pacpremion de Nobel en 1975.

**) Sacharov var fysiker och aktiv i det sovjetiska*

kärnvapenprogrammet. Men han blev senare dissident och kämpe för mänskliga rättigheter. Han fick Nobels fredspris 1975.

La 24an de oktobro gotenburgaj esperantistoj celebris la UN-tagon.

El la Homaj rajtoj de UN mi citas:

18. Libereco pensi. Ni ĉiuj havas la rajton kredi kion ni volas kredi, havi religion aŭ ŝanĝi religion se ni tion deziras.

19. Libere diri kion vi volas. Ni ĉiuj havas la rajton formi niajn proprajn pensojn, pensi kion ni volas, diri kion ni pensas kaj dividi niajn pensojn kun aliaj.

20. Renkonti homojn kie ajn. Ni ĉiuj havas la rajton renkonti niajn geamikojn kaj pace kunlabori por defendi niajn rajtojn. Neniu povas devigi nin aparteni al grupo, se ni tion ne volas.

21. La rajto pri demokratio. Ni ĉiuj havas la rajton partopreni en la registaro de nia lando. Oni devas permesi al ĉiu plenkreskulo elekti siajn gvidantojn.

/Siv

Pri Auschwitz – memoriga oficiala kunveno en Malmö pri la Holokaŭsto, la 13an de oktobro



Eble nia ĉefministro **Stefan Löfvén** atendis pliajn ĉefministrojn de pliaj landoj. Multaj anstataŭe sendis siajn subministrojn. Nia reĝo kaj reĝino ĉeestis.

En novembro Stefan Löfvén rezignos esti ĉefministro kaj estro de la socialdemokrata partio. Oni antaŭvidas ke la nuna financministro, Magdalena Andersson, anstataŭos lin. Tiukaze ŝi estos la unua virina ĉefministro en Svedio.

Malmö Internacia Forumo por la Memoro de la Holokaŭsto kaj la Batalo kontraŭ Antisemitismo estis organizita en Malmö de la Registraro la 13an de oktobro 2021.

En 2020, pasis **75 jaroj** de la fino de la dua mondmilito kaj la liberigo de Aŭŝvico-Birkenau.

La saman jaron plenumiĝos 20 jaroj ekde la unua internacia forumo en Stokholmo pri la holokaŭsto kaj la starigo de la Internacia Holokaŭsta Memor-Alianco (IHRA).

Malmö internationella forum för hågkomst av Förintelsen och bekämpande av antisemitism arrangeras i Malmö av regeringen i Malmö den 13 oktober 2021.

År 2020 var det **75 år** sedan andra världskriget tog slut och Auschwitz-Birkenau befriades.

Samma år är det 20 år sedan det första internationella forumet om Förintelsen i Stockholm och inrättandet av International Holocaust Remembrance Alliance (IHRA).

La bibliotekistino en Auschwitz

Verkisto: Antonio Iturbe.



Se vi regas la hispanan, la originan lingvon de la libro, aŭ la svedan – ne maltrafu legi tiun mirindan libron. Malgraŭ ke la temo estas malhela la libro postlasas pozitivajn sentojn.

Hispane: *La bibliotecaria de Auschwitz.*

En nia librorondo en Gråbo ni nun legas ĝin.

La loka bibliotekisto rekomendis ĝin.

Dek kvarjara Dita estas unu el multaj kiuj troviĝas en Aŭŝvico. Ŝi estas kondukita, kune kun siaj patrino kaj patro, de la Terezín-geto en Prago ĝis la fifama koncentrejo.

Tamen ŝi iel sukcesas adaptiĝi al la konstanta teruro en la tendaro. Do, kiam ja juda gvidanto Freddy Hirsch petas al Dita prizorgi ok skribaĵojn, kiujn la kaptitoj sukcesis kontrabandi sen esti malkovritaj, ŝi diras jes.

Kaj tiel ŝi fariĝas la bibliotekistino en Aŭŝvico.

Romano surbaze de la vera rakonto pri la iama aŭŝvica kaptito Dita Kraus.

Fjortonjara Dita är en av många som befinner sig i Auschwitz. Hon tas, tillsammans med sin mamma och pappa, från Terezín-gettot i Prag till det ökända fånglägret.

Hon lyckas dock på något sätt anpassa sig till den konstanta terrorn i lägret. Så när den judiske ledaren Freddy Hirsch ber Dita att ta hand om åtta skrifter som fångarna lyckats smuggla in utan att bli upptäckta, säger hon ja.

Och blir därmed bibliotekarien i Auschwitz.

En roman byggd på den verkliga berättelsen om den fd Auschwitz-fångnen Dita Kraus.

Nekredebla rakonto pri knabino, kiu riskis sian vivon por vivi la magian potencon de la libroj dum la holokaŭsto.

El unu el la plej malhelaj ĉapitroj en la homa historio aperas rakonto pri kuraĝo ekster la ordinara kaj pri espero. /Siv

En otrolig berättelse om en flicka som riskerade sitt liv för att hålla böckernas magiska kraft vid liv under Förintelsen.

Ur ett av de mörkaste kapitlen i mänsklighetens historia växer en berättelse fram om mod utöver det vanliga, och om hopp. /Siv

Pri gazetoj en la mondo

Esperanto-gazetoj tra la tuta mondo: delonge ekzistantaj gazetoj, spektu en YouTube:

https://www.youtube.com/watch?v=FuINb_1soF4

– jen mallonga, informa parolado!

Nur la plej grandaj, vaste disvastigitaj estas prezentitaj:

- **Revuo Esperanto** de UEA (Universala Esperanto-Asocio)
- **IPR** (Internacia Pedagogia Revuo) eldonata de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)
- **Juna amiko** ankaŭ apartenas al ILEI
- **La Ondo de Esperanto**, pri la rusa esperanto-movado
- **Libera Folio** kiu estas sendependa movada bulteno, kiu aperas nur en la reto. La redakcio de Libera Folio "strebas sobre kaj kritike prilumi aktualajn evoluojn en la Esperanto-movado".



- **La Heroldo de Esperanto**, organo de La Esperanta Civito.
- **La Literatura Foiro**

Tamen ekzistas multaj aliaj. Ni ĝis nun havis kontakton kun **Turka Stelo**, de Turkio, **La Bultineto** de Aŭstrio, **La Blanka Rozo** de Anglio, **Informilo** de Ĉeĥio, **Västsahara** (svedlingva) de Svedio kaj **Bulteno** de la Albana Esperanto-Instituto.

Ĉu vi volus rekomendi ankoraŭ pliajn? Bv. sciigi nin! /Siv

El la Bultineto, Aŭstrio

Baldaŭ 135-jara-prospero kaj tradicio de Esperanto.

Eĉ se vi ne konas la germanan, vi certe povas diveni la plejparton de la sekvanta teksto.

135 Jahre Erfolg und Tradition

1887 Das erste Esperanto-Lehrbuch erscheint

1905 1. Esperanto-Weltkongress in Boulogne-sur-Mer, Frankreich

1908 Gründung des Esperanto-Weltbundes UEA in der Schweiz: www.uea.org

1912 Die ersten Spesmilo-Münzen werden geprägt

1922 Erste Esperanto-Radiosendungen, in Newark und London

1938 Gründung des Esperanto-Jugendweltbundes TEJO: tejo.org

1959 Die ersten Stelo-Münzen werden geprägt

1965 50. Esperanto-Weltkongress in Tokio, der erste Weltkongress in Asien

1966 Pasporta Servo erscheint erstmalig: www.pasportaservo.org

Heute 1800 esperantosprachige Gastgeber in über 100 Ländern

1970 Das Definitionswörterbuch Plena Ilustrita Vortaro wird herausgegeben: kono.be/vivo oder vortaro.net

1980 Die Monatszeitschrift Monato erscheint erstmals: www.monato.net

1986 Erstmals ein Esperanto-Weltkongress in Beijing, China; neuerlich 2004.

2001 Chuck Smith gründet die esperantosprachige Vikipedio: eo.wikipedia.org

2002 Der Internet-Esperantokurs lernu startet: www.lernu.net

Mehr als 300 000 Anmeldungen bis heute

2006 Herzberg am Harz, Niedersachsen, wird offiziell Esperantostadt: esperanto-urbo.de

2008 Erstmals Esperanto-Prüfungen nach dem Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmen: www.edukado.net/ekzamenoj/ker

2011 Gründung von Muzaiko, Esperanto-Musik: www.muzaiko.info

2012 Google macht Esperanto-Übersetzungen

2014 Erstmals Esperanto-Fernsehen: Google > [esperanto televido](http://esperanto.televido)

2015 Duolingo – Neuer Esperantokurs für Englischsprachige, danach auch für Spanisch- und Portugiesischsprachige: www.duolingo.com

Mehr als 3 Millionen Anmeldungen bis heute

2017 102. Esperanto-Weltkongress in Seoul, Südkorea

2018 Die silberne 100-Steljo-Münze wird herausgegeben

2019 104. Esperanto-Weltkongress in Lahti, Finnland

2020 Zum Julia Isbrücker-Jahr erscheint die silberne 50-Steljo-Münze

2020 Eventa servo verzeichnet hunderte aktuelle Esperanto-Veranstaltungen

2021 Starker Anstieg der Esperantotreffen mit Zoom

2021 106. Esperanto-Weltkongress virtuell

2022 78. Esperanto-Jugend-Weltkongress

2022 107. Esperanto-Weltkongress in Montreal, Kanada

2023 108. Esperanto-Weltkongress in Turin, Italien

Kaj kio okazos al Esperanto en 2050, 3000, 3050 k.t.p? Eble temo por la skribokonkurso, anoncita en numero 43 kaj 45.

Ora Ĵurnalo n:o 43. Ĝis la 1a de decembro ni akceptos manusojn (siv.burell@gmail.com) /Siv



La Blanka Rozo



Revuo de la

FEDERACIO ESPERANTISTA DE
YORKSHIRE KAJ HUMBERSIDE

N-ro 290

AŬTUNO 2021

Estas interreze legi retgazetojn el aliaj landoj. Ĉi tiun fojon ni prenas parton de "La Blanka Rozo" kun permezo de ties redaktoro, Jack Warren (p.warren1947@gmail.com)

Sur la dua paĝo ni ekscias ke "Amikoj en la Skipton-Esperanto-Grupo" tradukas kantojn, kaj la unua estas Pli bona Mond'. Ili ankaŭ enmetis ĝin en Jutubon. La nomon de la kantistino mi ne scias. Estu inspiritaj fari similan kanto-produktadon en Svedio! Ni bezonas novajn kantojn!
/Siv

Kantu kun mi!

Cally Berry diras: Dum la lastaj kvar jaroj mi verkis kantojn en la angla lingvo. Dum la longa tempo kiam ni devis resti hejme mi decidis registri ilin kaj kreis jutubkanelon.

Se vi volas aŭdi aŭ eble kunkanti, jen la jutuboligo kaj la teksto.

www.youtube.com/watch?v=VRHYICB7XSA

Pli bona mond'

Se ni same kunsuferas, ni agu sen kverel'.
Por ke ĉiuj ni pluvivu, de riĉuloj venu help'.

Ni longe meditadis, kaptitaj en la hejm',
kaj timas eble perdi la karan vivon mem.

Refreno:

Pli bona mond', pli bona mond', urĝa la bezon'.

Decida hor', ni pelu for avidon je la mon'.

Malsatajn idojn tra la mond' subteni povus vi.
Per nia riĉo dividita prosperos ili pli!

Nun gravas tute ne la voj' prenita de ni jam.
Nun gravas nur la estontec', decidoj pro homam'





Pri gotenburgaj tramoj

Post la UK 2003 en Gotenburgo.

Laŭdata estu vi, haven' nordmara!
Holando vin beligis per kanaloj;
Nun benas vin tramservo senkompara,
Ligante urbokoron kun kvartaloj.

Por ĉiu celo tramo min atendas,
Blublanka kaj brilega la livreo;
La pordoj kiel koncertin' sin fendas,
Pelataj de elektro per troleo.

Salutas min maŝino aŭtomata
Per kiu validiĝas la biletoj.
Ekzumas nia ĉaro demokrata,
Vikinga ŝipo sur pavimŝtonetoj.

Preĝej' germana dekstre preterglitas;
Fulmetas akvo sub ĉielo blua.
Arganoj fiere konkurencon spitas
En tiu nobla urbo ŝipkonstrua.

Famuloj svedaj festas sur la vojo
Ĉe August Strindberg vibras la lipharoj.
Ekkantas sveda najtingal' pro ĝojo,
Responde pulsas ABBA kun gitaroj.

Kaj kiam ĉe kvartala finstacio
Alvokas hejmoj inter koniferoj,
Refendas sin la pordoj kun gracio;
Fantome malaperas pasaĝeroj.

Do: kiam ankaŭ mi fantomo estos
Mi flugos nek al aŭto nek al pramo,
Eĉ ne vesperte en tureto restos,
Ho ne – prefere gotenburga tramo!

Kaŝado kaj rivelado

Ankoraŭ ni bezonas maskojn, sed kiom longe? / Siv



1.

Pro pandemi' furoras truko,
Vizaĝojn kovras ni per tuko,
Kun bunta flor' aŭ verda stelo,
Ekde la nazo ĝis makzelo.

"Surhavu pro virus'!"

Sed ĉu simbolo

Ĝi estas, aŭ ĉu nura kapriolo,
Tiu tolo?

2.

Elegantulin' pasumas,
Io kara ŝin parfumas.
Gracia ŝia marŝostil',
Kaj ora la vizaĝprofil',
Kiel dafodil' de pasko,
El damasko.

3.

En kafej' spion' atendas,
Anonima en kompleto.
Iu lin al urbo sendas
Pro negoco en sekreto.
Ĉu kaŝas sin hispan', galeg' aŭ vasko
Sub la masko?

4.
Postebriul' el festo brua
Sternas sur parkobenk' senmova,
Strabas kontraŭ suno frua,
Frontas al mateno nova;
Konsolas sin per glut' el flasko.
Mankas masko.

5.
Jam enamiĝis Li kaj Ŝi
Kaj rendezuis en bazaro.
Kun ĝoj' alproksimiĝas li,
Karesas al ŝi la hararo ...
Kun vangofrapo li regresis;
Jen fremdulin'! Li miskaresis!
Blindigas amo. Ho fiasko
Pro la masko!

6.
Polican' aŭtiston bridis
Ĉar li sur strato tro rapidis.

Aŭtisto petas nun pardonon,
Proponante ŝmiromonon.
Biletojn – estas tuta fasko –
Kaŝas polican' sub kasko,
Kvazaŭ masko.

7.
En akuŝej' estonta patro
Subtenas flegistin' per teo;
Patriĝo – grava proceduro.
Li pensas: ĉu por bebo, ĉe la nasko
Estos masko?

8.
Ŝirmilon portas ĉiu homo,
Ĉu el tolo, ĉu en menso;
Malkaŝa restas nur la ono
Videbla tra publika lenso.
Sed kion montri, kion kaŝi sub la masko?
Jen la tasko.

*Koran Dankon al La Blanka Rozo!
Ingegerd, Andreas, Siv*

La mandato de UN – dekolonii Okcidentan Saharon



FN-mandatet är att avkolonisera Västsahara!

DE/AV LENA THUNBERG · PUBLIKIGITA/PUBLICERAT 2021–10–18

Fine de oktobro la Sekureca Konsilio de UN kunvenos por preni pozicion pri la problemo de Okcidenta Saharo kaj la mandato de la UN-forto Minurso.

I slutet av oktober sammanträder FN:s säkerhetsråd för att ta ställning till Västsaharafrågan och mandatet för FN-styrkan Minurso.

– Ĉi tiu renkontiĝo ne devas esti kiel la antaŭaj. La situacio estas tute nova, malsama kaj serioza.

La misfunkcio de la Sekureca Konsilio kondukis al la komenco de la milito denove.

Ĉi tio devas nun esti korektita, diras la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Fronto Polisario de Okcidenta Saharo, Brahim Ghali, en akra deklaro en gazetara konferenco la 16an de oktobro.

– La fakto, ke Staffan de Mistura estis nomumita UN-sendito ne estas celo en si mem. La celo estas fini la malkoloniigon de Okcidenta Saharo, la lasta kolonio de Afriko, kaj plenumi la mandaton de UN laŭ la sola interkonsento subskribita de ambaŭ partioj, kiu kondiĉas referendumon por la popolo de Okcidenta Saharo.

Brahim Ghali alvokas la Sekurecan Konsilion de UN fiksi templimon por la laboro de la nova sendito de UN kaj doni garantiojn, ke okazos referendumo pri memdeterminado.

– La kialo, kial la antaŭaj senditoj de UN malsukcesis en sia misio, estas ke Maroko obstrukcis, ke la Sekureca Konsilio de UN ne perforte certigis, ke la legitimaj rezolucioj estis efektividigitaj, nek ĝi prenis iujn ajn rimedojn por devigi Marokon plenumi kaj respekti internaciajn devontigojn, diras la Prezidanto de Okcidenta Saharo.

La Sekureca Konsilio ĝis nun manovris la konflikton anstataŭ solvi ĝin. Maroko uzis ĉion por foriri de la origina plano, diras Brahim Ghali. /Lena

– Det här mötet får inte bli som de tidigare. Situationen är helt ny, annorlunda och allvarlig.

Säkerhetsrådets dysfunktion har lett till att kriget åter startat.


Detta måste nu korrigeras, säger Västsaharas president tillika generalsekreterare för Polisario Front, Brahim Ghali, i ett skarpt uttalande på en presskonferens 16 oktober.

– Att Staffan de Mistura har utsetts till FN-sändebud är inte ett mål i sig. Målet är att fullgöra avkoloniseringen av Västsahara, Afrikas sista koloni, och att uppfylla mandatet från FN enligt det enda avtal som undertecknats av de båda parterna och som stipulerar en folkomröstning för det västsahariska folket.

Brahim Ghali uppmanar FN:s säkerhetsråd att sätta tidsramar för det nya FN-sändebudets arbete och att ge garantier för att en folkomröstning för självbestämmande ska äga rum.

– Anledningen till att de tidigare FN-sändebuden har misslyckats med sitt uppdrag är att Marocko har obstruerat, att FN:s säkerhetsråd inte med kraft tillsett att de legitima resolutionerna implementerats och inte heller vidtagit några åtgärder för att tvinga Marocko att verkställa och respektera internationella åtaganden, säger Västsaharas president.

– Säkerhetsrådet har hittills manövrerat konflikten i stället för att lösa den. Marocko har använt detta till att styra bort från den ursprungliga planen, säger Brahim Ghali. /Lena



Brahim Ghali, Västsaharas president tillika Polisarios generalsekreterare.

libera folio, mirinda revuo

sendependa movada bulteno (2021–10–21)

kiu permesas al ĉiu disvastigi artikolojn, se oni nur informas pri la fonto. Ora Ĵurnalo iam havis artikolon pri la fervoja stacidomo en Halbe. <https://www.liberafolio.org/>

Esperanto-Stacio proponas lokon por kuna agado

Dum UEA malmuntas sian Centran Oficejon, apud Berlino *Ralf Fröhlich* starigas novan ejon por Esperanta aktivado. "Por la identeco de nia komunumo ni bezonas ankaŭ fizikajn lokojn kie vivas esperantlingva laboretoso", li diras al Libera Folio. Post kelkaj tagoj oni ludos komputilajn ludojn en la Esperanto-Stacio.



La Esperanto-Stacio.

La Esperanto-Stacio en Halbe, kvindek kilometrojn sude de la centro de Berlino, estas konstruaĵo, de kiu la germania fervoj-kompanio volis liberiĝi. Ĝin en 2019 aĉetis la

konata aktivulo Ralf Fröhlich, kaj de tiam ĝi estas renovigata.

Kiam la riparoj pretos, laŭplane post pliaj ses monatoj, en la domo estos kvar loĝejoj por kunlaborantoj, kvin ĉambroj kun propraj banĉambroj por gastoj, du ejoj por aranĝoj kaj kunlabora spaco por oficeja laboro.

– La domo estas internacia renkontiĝejo por esperantistoj kaj samtempe regiona kultura centro. **Ĝi ĵus estis nomumita kultura centro de la federacia ŝtato Brandenburgio kaj pro tio havos subtenon por regiona kulturlaboro dum almenaŭ tri jaroj, Ralf Fröhlich rakontas.**

Dum la renovigado jam okazis diversaj aranĝoj, kaj post la jarŝanĝo en la komuna oficeja spaco laboros kaj aktivuloj de la Esperanto-Stacio kaj tiuj de aliaj kulturaj organizaĵoj. Ralf Fröhlich proponis lokon en la ejo ankaŭ al UEA kaj TEJO.

– Sed ŝajne la decidoj daŭras, li aldonas.

Kial laŭ vi en la nuna reta epoko, kiam eĉ UEA planas vendi sian Centran Oficejon, esperantistoj plu bezonas proprajn fizikajn ejojn?

– La retigo kaj ciferecigo de la mondo ankaŭ ŝanĝas la kondiĉojn por la esperanto-movado. Kompare al nia grandeco ni bonege uzas la eblecojn retajn kaj tion daŭre devas fortigi.

– Samtempe mi estas konvinkita ke por la identeco de nia komunumo ni bezonas ankaŭ fizikajn lokojn kie vivas esperantlingva laboretoso, kie eblas kuniĝi kaj kune labori kaj kie eblas krei kondiĉojn por retaj aktivaĵoj. La Esperanto-Stacio celas esti vigla loko kaj

por kulturo, edukado, libertempado kaj kunlaboro.

Jes, kial ne aranĝi vojaĝon al Halbe?

/Siv




Prezentado en la Esperanto-Stacio.

”Arne, la ĉefido”, nun ankaŭ en la albana



El ”Bulteno de la Albana Esperanto-Instituto” n:o 161 (septembro–oktobro 2021).

Birgitta Anevik trovis la tekston sur paĝo 10 de la Bulteno:



La novelo ”Arne la ĉefido” de la sveda verkisto Leif Nordenstorm nun ankaŭ troviĝas en la albana.

”Oktobre nia plej juna esperantisto, la albana reprezentanto de TEJO, Juri Andoni, fintradukis en la albanan la novelon ”Arne, la ĉefido” de Leif Nordenstorm.

Antaŭ kelkaj monatoj Juri ricevis permeson de sinjoro Nordenstorm kaj dum someraj ferioj li sukcesis traduki la tutan novelon. Nun ni estas serĉante eblecon por la eldono”.

Birgitta diras: *”Mi esperas ke la sveda libro baldaŭ troviĝos prezita en la albana!”*



HeKo – retagentejo de la Esperanta Civito

Laŭ Bertil Nilsson esperantistoj de malsamaj "branĉoj" ne scias unu pri la aliaj. Do ni almenaŭ plusendos la informon.

Forta ekspansio de la konsorcia aktiveco

La komisiono pri bibliotekoj fariĝos konstanta kaj envolvos pliajn aktivulojn: tion decidis hodiaŭ la Kapitulo diskutinte la raporton de sen. Manuela Blanco pri la unua komisiona kunsido. Surbaze de alia raporto, la Civila Esperanta Servo transformiĝos al aŭtonoma stablo, kun jura sidejo en afrika lando kie Servo Civila Internacia ne havas sektion.

La Kapitulo ekzamenis informojn kaj raportojn pri la dua Monda Pac-Kongreso en Barcelono, pri la evoluo de Esplora Instituto de Esperantologio en Svislando, kaj pri aliaj projektoj. Aparte rimarkinda estas la vigleco de KCE en Ĉaŭdefono kaj de Esperanta Naturamikaro en Hispanio.

Pro Esperanto komunikis detalojn pri la investa strategio rilate al nemoveblaĵoj. La Civita "banko" administras domojn kaj kontorojn en Svislando, Hispanio, Burundio, Svedio, Belgio, Hungario.

[HeKo 774 5-C, 22 okt 21]

Kio estas HeKo kaj kio estas Esperanta Civitano?

HeKo estas novaĵagentejo je la servo de la stabloj en kaj apud la Pakto por la Esperanta Civito, sub la imprimaturo de la Konsulo aŭ lia delegito. La informoj estas: oficialaj de la Civitaj instancoj, se indikitaj per la litero C; bultenaj de paktintaj stabloj, se indikitaj per la litero B; alies neoficialaj, pri kio ajn utila por la evoluo de Esperantio, se indikitaj per la litero A. Kaj pri Eŭropaj institucioj, se indikitaj per la litero E.

Eblas SENDI KOMENTARION aŭ ARTIKOLON tra la redakcia adreso. Publikigo estas rajto por kiu havas la esperantan civitanecon, laŭdiskreca por la ceteraj.

Eblas donaci monon por subteni nin pere de PayPal-konto: bonvolu demandi tra la redakcio.

Nia poŝta adreso: Esperanta Civito > HeKo, strato Edinburgo 26, BE-1050 Bruselo (Belgio)

Se vi volus scii pli pri "Esperanta Civitano" – sendu vian adreson al gbg@esperanto.se kaj ni plusendos ĝin al Bertil Nilsson, Stokholmo. /Siv

Pri Louis Armstrong

de Inga Johanson

Louis ARMSTRONG, karesnome "Satchmo", naskiĝis la 4-an de aŭgusto 1901 en Luiziano, mortis la 6-an de julio 1971 en Novjorko.

Li estis usona trumpetisto kaj kantisto.

Ek de 50 jaroj Louis Armstrong ne plu ludas sian trumpeteton.

Vi povas legi pli en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis_Armstrong



En oktobro aperis la jena kanto kun
esperanta subteksto de Antono Samak:

Louis Armstrong – What A Wonderful World – Esperanto – YouTube

<https://www.youtube.com/watch?v=6eeqJ3YuYHw>

La subteksto:

Verdas arbaret', ruĝas rozuj'
Kaj flor-abund' por ni ĉiuj.
Jen mi pensas tiel: Kia mirinda mond'!
Kaj jen alt' en blu', nubar' en blank'.
Sun' ardas je ben', ravaĵ' en noktfal'
Kaj mi pensas tiel: Kia mirinda mond'!

Koloroj de l' pluvarko
ho, belas en la alt',
kaj ankaŭ sur vizaĝoj de l' homoj sur la strat'.
Sonas jen kun manprem',
"Salut' al vi, salut' kun la mien':
"Am' en pur".

Ploras bebinfan', kreskiĝas jam
lernas pli nun ol mi iam ajn'.
Kaj mi pensas tiel: Kia mirinda mond'!
Jen mi pensas tiel: Kia mirinda mond'!

**(Mi kalkulas ĝis 24 apostrofoj (kun signifo de
mankanta -o) – ĉu ne eblas redukti ilin, mi
demandas al mi.**

**Se vi preferas aŭskulti kantiston kun
esperantaj vortoj vi povas klaki al la
malsupra ligilo, trovita de Inga, sed tiuokaze
vi ne aŭskultos Louis Armstrong, sed Andrey
Bazikov (Garsia). /Siv)**

https://tubaro.aperu.net/v/ytb_Ty4yebU4eQs/

**(La tradukisto Pablo 'Busto ankaŭ uzas tiom
da apostrofoj, sed eble iomete malpli. /Siv)**

Danny Kaye & Louie Armstrong – When the Saints Go Marching In

Vi trovas ĝin per:

<https://www.youtube.com/watch?v=Fsx6mUoTHUM>

Ĝuu la kantojn. /Inga



La Gotenburgaj Koloristoj

Göteborgkoloristerna

de Ingegerd

Parto 3 / Del 3



Ivan Ivarsson naskiĝis en "Stampgatan" la 20:an de julio en 1900 kaj finis siajn tagojn en Parizo la 26:an de junio en 1939. Mallonga kaj intensa pentristvivo.

Li estis ankaŭ unu el ili kiu kuniĝis ĉirkaŭ Tor Bjurström ĉe la pentrista lernejo "Valand" dum la jaroj 1922–1925. Tiam li loĝis en la domo de sia gepatroj en "Hagen" en la okcidenta parto de Gotenburgo.

La "koloro" daŭris flui per inspiro de Pierre Bonnard, kiun li renkontis dum siaj studvojaĝoj al Francio kaj Italio. Ivan havis eblecon pentri en la laborejo de Karl Kylberg en Danio dum kelka tempo en la fino de 1920:a jardeko kaj la koloro estis la esenca ankaŭ tie. Depost 1930 li estis plej aktiva en Gotenburgo kaj Bohuslando.

La pentradon de Ivan Ivarsson oni povas priskribi kiel naivecan kaj ĝojoplenan.

Do, li estis rekonita nur en pli malgrandaj artogrupoj dum sia vivtempo kaj inter la temoj pri provincaj ejoj, havenoj, homoj kaj bestoj li permesis la vivĝojon elflui en simfonio el la kolora paletro.

La arto de Ivan Ivarsson estis prezentita en la urbaj muzeoj en Gotenburgo kaj Norrköping, ankaŭ en la nacia muzeo en Stokholmo. Serĉu volonte en libroj kaj en interreto pri pli da bildoj kaj informoj. En griza tago estas kvazaŭ la koloroj kaj la lumo leviĝas el la pentraĵo kaj disdividas sian kolorriĉan ĝojon rekte en la koron. Se tio ne estas granda arto, tiam mi ne konas kio arto estas.

/Ingegerd

Ivan Ivarsson fodiĝis sur Stampgatan den 20:e juli år 1900 och slutade sina dagar i Paris den 26:e juni år 1939. Ett kort och intensivt mållarliv. Han hade också varit en av de konstnärer som samlats omkring Tor Bjurström vid Valands mållarskola under åren 1922 – 1925. Han bodde då i familjens villa i Hagen ute i de västra delarna av Göteborg.

Färgen fortsatte att flöda under inspiration av Pierre Bonnard som han stötte på under studieresor till Frankrike och Italien. Ivan fick möjlighet att måla i Karl Kylbergs ateljé i Danmark en tid i slutet av 1920-talet och färgen var det väsentliga även där. Från 1930 är han främst verksam i Göteborg och Bohuslän.

Ivan Ivarssons måleri kan man beskriva som ett naivistiskt och glädjefullt måleri. Han blev bara erkänd i mindre konstgrupperingar under sin livstid och bland motiven av landskap, blommor, hamnar, människor och djur låter han livsglädjen välla fram i en symfoni från färgpaletten.

Tyvärr drabbades Ivan Ivarsson av depressioner som ledde till alkoholism.

Han hade dock en lycklig period tillsammans med hustrun och en son i avskildhet på Stenungsön i Bohuslän. Sina sista år tillbringade han i Frankrike där han slutade sitt färgglada liv.

Hans konst finns representerad på konstmuseerna i Göteborg och Norrköping samt på Nationalmuseum i Stockholm. Sök gärna efter Ivan Ivarssons konst i böcker och på nätet. En grå dag är det som att färgerna



och ljuset lyfter från "duken" och delar med sig av sin färgrika glädje rakt in i hjärtat. Om inte detta skulle vara stor konst då undrar jag vad konst är till för.

/Ingegerd

Galerio

de Ivan Ivarsson



Nova infanlibro de Julian Modest



Mirakla fabelo – infanlibro, originale verkita en Esperanto. Eldonis Libera – 2021.

Julian Modest estas konata aŭtoro de multaj libroj kaj nun antaŭ la Kristnaskaj festoj kaj la Nova jaro aperis lia infanlibro "Mirakla fabelo", en kiu la verkisto rakontas pri multaj mirakloj. En malvarma vintra nokto iu neĝhomo, farita de infanoj, subite ekparolas. Ĝi ne deziras esti sola, sed havi amikojn kaj travivi neordinarajn aventurojn. Ĉio en la libro estas alloga kaj fabele bele.

Inter bestaĉoj kaj bestaj estaĵoj en la zoo de Borås! Bland odjur och djur i Borås djurpark!

Printempa aventuro kune kun la familio – Ett våräventyr med familjen.

Atentu! – Se upp!

de Ingegerd

Kion Zoe ekvidis? Ĉu eble estas ĉevalo? Se ne, mi pensas ke estas "dinosauŝo", ĉar mi scias ke ŝi havas multe da dinosauŝraj ludiloj!

Vad har Zoe fått syn på? Kan det möjligtvis vara en häst? Om inte, tror jag att det är en "Skräcködlor" för det vet jag att hon har massor av modeller av!



Jes, certe estas "dinosauŝoj"!

Ja, visst var det "Skräcködlor"!

La ĝojo estas granda kaj baldaŭ Zoe kaj Elina konatiĝos kun la teruraj skulptaĵoj en la parko.

Glädjen är stor och snart bekantar sig både Zoe och Elina närmare med de fruktansvärda skulpturerna i parken.

Vidu! – kiel dolĉa ĝi estas, ĉu ni ne havu similan sur la gazono? La nepoj amusiĝas dum tre longa tempo en la tiel nomata "Dinoparko". Ili grimpas kaj rampas, de unu Dinobesto al alia, kelkaj similas al birdoj kaj aliaj similas al rinoceroj kaj hipopotamoj!

Titta! – så gullig den är, kan vi inte ha en sådan här hemma på gräsmattan? Barnbarnen roar sig både länge och väl i den så kallade "Dinoparken". Det klättras och klängs, från det ena till det andra dinosauriedjuret, somliga ser ut som fåglar, andra liknar noshörningar och flodhästar!

Kiam ni iom post iom iras plu en la parko ni staras momente sur la ponto kaj ekvidas la platonajn kaj meditemajn fenikopterojn meze en la akvofluo. Pri kio ĝi pensas? – Manĝaĵoj eble, aŭ la gapantaj familioj en malsimilaj epokoj en la vivo. Bebĉaretoj aŭ bastonoj. Ĉiuj specoj da homoj estas ĉi tie. Meze dum la unua "Koronatempo", kaj oni devas teni distancon, same kiel faras la fenikoptero!

När vi så småningom vandrar vidare i parken står vi en stund på bron och tittar på den platoniskt begrundande flamingon mitt i vattenströmmen. Vad tänker han på? -Mat, kanske eller de gloende familjerna i olika stadier i livet.



Barnvagn eller käpp, alla sorters människor är här. Mitt i första Coronatiden, och man ska hålla avstånd, precis som flamingon gör!

"Kolonelo Hati" la elefanto distrumpetis super la savano, "Nun Christin venas sur la vojeto! Ŝi vere povas ludi la trumpeton!" La mesaĝo de la elefanto eĥas super la tuta savano ...

"Överste Hati" elefanten, har trumpetat ut över savannen att "nu kommer Christin på stigen! Hon kan verkligen spela trumpeten!" Elefantens budskap ekar ut över savannen...

Tie ĉi ŝi iras, la trumpetisto pri kiu "Kolonelo Hati" trumpetis novaĵon super la savano. Sed hodiaŭ la arĝentsona trumpeto pendas sur la hejma muro. Tamen en la parko iuj blovas la trumpetojn.

Här går hon, trumpetaren som "Överste Hati" trumpetade ut en nyhet om över savannen.



Fast idag hänger den silverklingande trumpeten hemma på väggen. I parken trumpetas det ju ändå.

Vid-al-vid al la elefanto staras tri ĝirafoj kiuj preparas sin por promenado sur la savano. Ili vere interrilatas kun la aliaj specioj de bestoj kiuj amikiĝas tie ĉi. La ĝirafoj ankaŭ ŝajnas interesiĝi pri la homoj irante sur la vojeto.

Mitt emot elefanten står tre giraffer som gör sig redo för en promenad ut på savannen. Dom har verkligen överseende med de flesta arter som samsas där. Giraffen verkar också vara intresserad av oss människor där vi går på stigen.



La rinocero, certe li, per sia peza malgracieco memorigas min pri la prabestoj en la Dinolando. Mi demandas min kiel li pensas? Mi ĉiuokaze divenas ke oni ne devus kolerigi la rinoceron. Estus neegala batalo.

Noshörningen, visst påminner han i sin tunga klumpighet om djuren i urtidsparken. Undrar hur han tänker? Jag gissar i alla fall att det inte är bra att förarga detta djur, det skulle bli en ojämn kamp.

La grandaj strutoj vagadas ĉirkaŭe inter la aliaj gigantoj sur la savano. Ĉiuj rigardas supren al la vojo. Oni ne povas paroli pri "struta mensostato" ĉe ili. Troviĝas libro kun reala rakonto pri knabo kiu forestis dum sabloŝtormo. Dum multaj jaroj li vivis inter strutoj. "La knabo kiu vivis kun strutoj" nomiĝas la libro. Tre streĉa kaj kortuŝa libro pri homa vivo. Troviĝas kaj en la sveda kaj en Esperanto.

De stora strutsarna strosar omkring bland de andra giganterna på savannen. Alla spanar uppåt vägen så någon strutsmentalitet är det inte tal om hos dem. Det finns en bok med verklighetsbakgrund om en nyfödd pojke som kom bort i en sandstorm och under många år levde bland strutsar. "Pojken





som levde med strutsar” heter den. Våldigt spännande och gripande bok om ett människoliv. Finns på både svenska och esperanto.

Kafuma paŭzo nun! Elina volas kukojn kaj ni aliaj trinkas kafon el la apuda kiosko. Tre bone ripozi iom post la longa promeno tra la savano.

Nu är det fikapaus! Elina ser fram emot ”kakor” och vi andra dricker kaffe från den närbelägna kiosken. Gott att vila sig lite efter den långa promenaden genom savannen.

Kaj ripozi estas io, kion la leona reĝo estimas super ĉio. Tie ĉi, li kuŝas en plej granda mallaboremo inter siaj adorantinoj. La printempa suno brilas, estas trankvile kaj agrable esti leono hodiaŭ.

Och vila sig! Det är något som lejonkungen uppskattar över allt annat. Här ligger han i största lättja bland alla sina beundrarinnor. Vårsolen gassar, det är lugnt och skönt att vara lejon idag.



La gepardo estas kaj la plej bela katbesto kaj la plej rapida sur la savano. La gepardo povas kuri en rapideco de po cent kilometroj por horo. Estas vere rapide!



Geparden är både det vackraste kattdjuret och det snabbaste på savannen. Den kan springa i en hastighet om hundra kilometer i timman. Det är fort!



Estas Shere Kahn, la tigro kiu ripozas sur la vojeto... Plej bone ne vekti lin, li povas esti danĝera ... kaj la tigro estas danĝere bela!

Det är Shere Kahn, tigern, som vilar på stigen ... bäst att inte väcka honom, han kan vara farlig... Och farligt vackert är han!

La ponto al la nordiaj bestoj. Zoe esperas vidi ĉevalojn ie ...

Bron, över till de mer nordiska djuren, Zoe hoppas på hästar någonstans ...

"Oĉjo arbaren promenis kun / rozoj sur vangoj, okuloj kun sun'..." . Estas vera urseto kiu ne dormas en vintrodormejo ... bonŝance. Ili sciis naĝi tre bone kaj plaŭdis ĉirkaŭe en la akvo kaj spruĉis grandajn nubojn de akvo kiam ili skuis sin sur la grundo.

Mors lille Olle i skogen gick, rosor på kinden och solsken i blick... Det här var ju en riktig nallebjörn som inte låg i ide ... det var ju tur. Dom var väldigt simkunniga och plaskade omkring i vattnet och skvätte stora moln när dom ruskade sig uppe på land!



Fine!

Zoe estas ĉe sia celo, la ĉevaloj, kaj ŝi estis feliĉa!
Ĉevaloj, la plej granda celo!

Elina, patrino Anneli, onklino Christin kaj avino Ingegerd ankaŭ ŝatas ĉevalojn. Tiel ni staras longe kaj refortigas la krurojn. Krom tio, ĉevaloj tre bonodoras, odoras sekurecon.

Till slut!

Zoe är framme vid sitt stora mål, hästar och hon är lycklig.

Elina, mamma, moster och mormor tycker ju också väldigt mycket om hästar så här står vi och vilar benen en bra stund.

Dessutom luktar det så gott om hästar, det luktar trygghet...

La Hieno, la granda "novaĵankro" en la parko, promesis rakonti pri la fantazia bestaventuro por la gazeto "Ora Ĵurnalo". Ĉiuj el la bestoj en la parko konsentas pri tio ne konsiderante se ĝi ronkas, trumpetas, sunas, ripozas, kuras rapide, henas aŭ babilas.

Hyenano, det stora "nyhetsankaret" i parken, har lovat att berätta om det stora djuräventyret i tidningen "Ora Ĵurnalo". Det gillar alla de deltagande djuren antingen de snarkar, trumpetar, solar, vilar, springer fort, gnäggar eller tjattrar.



"Venu por viziti nin iam" la bestoj en la parko salutas per la "hieno", alinome Ingegerd.

"Kom och hälsa på oss någon gång", hälsar alla djuren i parken genom "Hyenano" alias / Ingegerd.



Baltiaj Esperanto-Tagoj

(mallonge: BET) estas Esperanto-renkontiĝo organizata ĉiujare ekde 1959 en iu el la apudbaltmaraj ŝtatoj, laŭvice en Latvio, Litovio kaj Estonio

BET n:o 56, la 9–17an de julio, 2022

Jen letero de **Povilas JEGOROVAS**, la Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio kaj prezidanto de Organiza komitato de BET-56:



Estimataj kaj karaj,

Post dujara deviga pandemia paŭzo la 56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio la 9–17-an de Julio, 2022, ĉi-foje en Litovia havenurbo Klaipėda apud Balta maro, en la universitato de Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio invitas Vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. La aranĝo estas dediĉata la la 770-jariĝo de Klaipėda kaj al la 135-jariĝo de Esperanto.

BET-56 havas aŭspicion de la Universala Esperanto-Asocio.

Alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de Klaipėda Vytautas GRUBLIAUSKAS.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa bulteno pri BET-56 ĉi tie:
<https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/>

Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie:
<https://mallonge.net/gl>

BET-56 havas ĉiuf flankan subtenon kaj helpon de urbaj instancoj de Klaipėda kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj de Litovio.

Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo.

BET-56 estos vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La programo kiel kutime dum BEToj estos tre varia kaj interesa.

Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉi sanprotektaj aferoj por eviti pandemiajn danĝerojn.

Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30–40 landoj.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Konstante aktualigataj ĉiusecaj informoj pri BET-56 estas en ties retejo:

<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto, kie estas akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo:
<https://sezonoj.ru/bet/>

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa Servo:
<https://eventaservo.org/e/BET-56>

Listo de jamaj aliĝintoj al BET-56 estas ĉi-tie:

http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&diupage=1&sn=off&ss=on&sc=on&defect_arange=the_adnum&desc=asc&no=0

Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas spektebla ĉi-tie:

http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&diupage=1&sn=off&ss=on&sc=on&defect_arange=the_adnum&desc=asc&no=0

Bonvolu plani vian partoprenon en tiu-ĉi grava internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj vialandaj naciaj esperantistaj informkanaloj.

Informa bulteno pri BET-56, elŝutebla aliĝilo kaj emblemo de la aranĝo estas ankaŭ al kroĉitaj.

La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila. Partoprenu mem kaj invitu la aliajn.

Esperante, ke Vi kaj multaj aliaj esperantistoj partoprenos

Amike,

Povilas JEGOROVAS

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio
Prezidanto de Organiza komitato de BET-56
Tel. mobil. +370 687 12219
pjedorovas@yahoo.com